

oj, kaleŝoj k ceteraj baris la vojojn al piedirantoj. La eminenta d-ro Asuero atente ekzamenis la knabinon k deklaris, ke ŝi estas sana k normala... Mercredon, 8. julio... ĉeestis proksimume dekdu mil personoj; la aŭtomobiloj estis ducent dek...“ ktp.

Kion signifas tiu spektaklo? Ĝi estas lerte enscenigita de la pastraro, kiu defendas sian reĝimon kontraŭ la respublika laikismo, kiu lasta minacas per pereco ĝian potencon. Tiu ruze aranĝita scenajo estas nenio ol politika manovro — por konservi al si la simplanimajn popolamasojn. El la fino de l' artikolo, en kiu estas parolite pri „eklezia proceso, kiu baldaŭ komencos la aŭtoritatuloj“ pri ĉi tiu afero, oni povas klare ekkoni, ke tiu komedio

devas servi al la katolikismo por vasta propagando, kiun ĝi en nuna momento treege bezonas, ĉar ŝanceliĝas la malnovaj kredoj ankaŭ en ĉi tiu katolika lando. Ni esperu, ke la nova reĝimo permesos al la liberpensuloj fari ĉion, kio estas en ilia povo, por alporti lumon al la amasoj k klarigi al ili, kion signifas tiu nova „miraklo“.

### Preĝado ĉe la militistaro.

El la nova preĝaro por anglaj soldatoj mi citas jenan preĝon: „Ho Sinjoro Dio, pro tio ke nenio estas tro malfacila al vi, por pligrandigi la fidon, ni petas, je la parto de la Lankaŝiraj fuzilieroj, ke ni povu ornamo nin per kuraĝo kiel per floro en la batal-

tago. Kaj aŭdante la voĉon de tiu, kiu estas dirinta: „Ĉio estas ebla al tiu, kiu kredas“, ni povos toleri ion ajn pro la amo de vi, la sama Jesuo Kristo, nia Sinjoro.“

La absurdo pli-elmontriĝus ankoraŭ, se oni havus internacian kolekton da tiaj soldatpreĝoj. Do, K-doĵ, mi petas vin sendi al mi ekzemplon el via lando.

Alb. Dean,

6 Heath Str., Lower Broughton M.C., Anglio.

### Atentigo!

K-doĵ, kiuj deziras vidi en la Jarlibro antaŭ sia nomo signon pri partianeco, devas sciigi tion al la Administracio antaŭ la 15. decembro.

# TRA ESPERANTIO

## Akcesorajo.

Kiu studis iomete la historion pri la mondlingva movado ĝenerale k aparte pri esperanto, tiu bone scias, kiom da „sciencaj“ argumentoj estis eldirataj de gravaj, aŭtoritataj fakuloj por pruvi, ke artefarita lingvo estas neeblajo, sensencaĵo. Por multaj diplomitaj lingvistoj la provo starigi artefaritan lingvon similas la agon de d-ro Faŭsto, provanta krei vivan estaĵon en sia retorto.

La nombro de tiaj scienculoj pli k pli malpligrandiĝas; sed ekzistas ankoraŭ kelkaj, kiuj obstine fermas la okulojn por ne vidi la faktojn, por ne konstati, ke la ĉiuaga uzado de esperanto refutas la belfrazajn, teoriajn argumentojn.

Ceterè similan rimarkon oni povas fari sur aliaj kampoj de la teorio k praktiko. Eminentaj personoj ja asertis, ke fervojoj neniam havos estonton, ke estas tute utopia la celado organizi transportadon per tia rimedo. Aliaj ne malpli eminentaj sciencistoj pruvis per  $A+B$ , ke flugmaŝinoj pli pezaj ol la aero neniam sukcesos funkcii.

Tamen tiaj „sciencaj“ pruvoj ne sukcesis malkuraĝigi la elpensemuojn, kiuj estis instigataj de ia nekontraŭstar-eblo intuicio k gvidataj de empiria metodo.

Malgraŭ la teoriaj pruvoj de aŭtoritataj fakuloj la tuta terglobo kovriĝis per fervoja retaro, la ĉielo pleniĝas pli k pli per helicaĵoj zumadoj k sonas esperanto en kongresoj, en kunvenoj, en hejmoj inter geedzoj k eĉ infanoj. Tiaj estas la faktoj k ili argumentas pli forte ol la plej subtilaj teoriaĵoj de fakuloj.

Kaj ni ne forgesu, ke la aŭtoro de esperanto ne estis lingvisto, sed simpla okulisto. Kia ironio! ...

\*

Sendube la ĉi supre aluditaj fakuloj ridindigis sin; sed ne malpli ridindaj ŝajnas al mi tiuj esperantistoj, kiuj nuntempe abunde liveras teoriajn argumentojn por pravigi... la ekziston k funkciadon de esperanto. La argumentado de tiuj novspecaj teoriuloj plej ofte kaŭzas nekontraŭstareblan oscedon ĉe la leganto, sed almenaŭ ĝi estas rimedo por kovri banalaĵojn per sciencoaspekta volvaĵo. Kaj la efiko de tio ĉe kelkaj naivaj legantoj estas, ke ili des pli opinias la traktaĵon serioza k valoro, ju malpli ili komprenas ĝin. Kaj ties aŭtoroj tiel akiras reputacion de lingvista kompetento...

Fakte la tuta afero estas ridinda por pripensemaj homoj. Simpluloj ja uzas ĉiutage esperanton k sekve ne bezonas cerbumadi por scii, ĉu tia uzado estas konforma aŭ ne al lingvistikaj postuloj. Uzantoj plie ekridegas, ĉe la konstato, ke en la verkoj de teoriuloj troviĝas kelkloke plej elementaj gramatikaj eraroj; tiam praktikuloj emus instrui al pretendemaj aŭtoroj, ke iliaj verkoj indas esti metataj flanken k estonte lasos ilin flanke.

Jes ja, la homoj, kiujn gvidas nur la simpla saĝo, kritikeme rilatas al ŝajnciencaj verkoj, kiuj sonas malplene ĉe frapo de laborula mano. Aristarko.

### Socialistaj esperantistoj atentulo!

Jus leginte en germana gazeto sciigon, kiun mi traduke reskribas, mi turnas min al vi, k precipe al la anoj de partioj apartenantaj al la Amsterdama Internacio, ke vi sendu protestojn por pruvi la utilon k disvastiĝon de esp-o.

Jen la traduko. *Reform-anglan lingvon* kiel mondlingvon intencas enkonduki en Berlin fondita Anglio-Klubo, al kiu inter aliaj apartenas Ajnŝtajn (Einstein), Lebe (Löbe) k la ekscĉefministro Marks (Marx), ĉar provoj pri

artefaritaj mondlingvoj ĝis nun montriĝis sensukcesaj. La planita reformo de la angla lingvo plejparte rilatas al la ortografio...

Do, neniu alia, ol la eminenta gvidanto de l'socialdemokrata partio, la prezidanto de la regna parlamento en Germanio, havas la tempon dum tiuj krizaj tagoj de la partio mem k de la tuta popolo, sin okupi pri tiaj sensencaĵoj. Gek-doĵ ĉiulandaj, ni protestu kontraŭ tio pere de la socialista frakcio. Sendu multajn protestskribojn al K-dino E. F. Klatil, Hectorstrato 4. I, Amsterdam-Z. Tio estas tasko tre grava por nia frakcio.

11309.

*Ni ricevis jenan tekston kun insista peto pri publikigo:*

„La Centra Estraro de Laborista Esp. Asocio „Laboro“ en Pollando protestas plej energie kontraŭ la neallaso de reprezentanto de ukraina popolo al la salutparolado dum la malfermo de l' 23-a Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo dum aŭgusto 1931.“

### Ne forbiciklu eksterlanden senprezare!

Mi volas averti K-doĵn intencontajn bicikli eksterlanden okaze de strangaj spertoj dum mia biciklado por atingi Turkion. Surprizita mi estis, ke ĉe la german-aŭstra limo estis postulata t.n. garantismo de 60 mk. germ. pro la enkonduko de biciklo. Kiel senlaborulo mi ne posedis tiun sumon, sed fine sukcesis konvinki la aŭstran doganiston, ke mi neniaokaze vendos mian „feran ĉevalon“, nepre bezonante ĝin por la pluvojaĝo. Kvankam tiu doganisto respondis al mi, ke ĉe la jugoslava limo oni ne postulus deponon de monsumo, oni ĉe la tiea limo postulis eĉ pli altan garantisumon, k klarigis, ke la samo okazus al mi ĉe la bulgara limo. Mi tro malfrue eksciis, ke se mi estus ano de la germana lab. bicikla unuiĝo „Solidaro“, mi povus enveturi ĉiujn landojn